

Hermann Löns,  
Lüneburga erikejo

*tradukita de Oskar Breddermann*

1. Lüneburgan erikejon  
en mirige bela land'  
mi trapasis ĉiuloken,  
multon montris voja rand'  
Faleri, falera  
ho; karul', karulin',  
via ja scias, scias ja.

3. Fratoj, lasu glasojn tinti;  
ĉar la muskatela vin'  
acidiĝus pro maluzo,  
tial ne eltrinku ĝin.  
Faleri, falera  
ho: karul', karulin',  
via ja scias, scias ja.

3. Ruĝajn cervojn ni ekĉasu  
gaje en arbaro, dum  
niaj hundoj laŭte bojas  
kaj pafiloj krakas "bum".  
Faleri, falera  
ho; karul', karulin',  
via ja scias, scias ja.

4. Vi belega, vi ĉarmega  
kvazaŭ lakt' kaj sango, flor';  
ni anime kunligiĝu  
kaj nin amu kor' al kor'.  
Faleri, falera  
ho; karul', karulin',  
via ja scias, scias ja.

*Traduko de la Germana poemo "Auf der Lüneburger Heide" de HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de Oskar Breddermann.*

*Arg-624-1262 (2012-10-23 21:11:11)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kantlibreto "Jen la kanto de l' vojaĝ'", eldonita de Dansk Esperanto-Forlag en la jaro 1973, represita de D.E.F. (Dana Esperanto-Federacio).*